

La NASKa Fasko

Ĵurnalo de la Nord-Amerika Somera Kursaro de Esperanto, ĉe la Universitato William Peace

mardon, la 5-an de Julio, 2016 • numero ok

Pli pri la Tojvo

de *Filipo DORCAS*

Jen mi por la lasta tasko

Verkas por La Naska Fasko

Sed la vortoj kiel tojvo

Ne troviĝas en la PIV.

Pli da vortludoj

de *Zerbie*

- Mi aŭdis iam pri homo kun multaj elfaraj; entute pli ol mil elfoj.
- Ĉu la homo, kiu laboras sub redakt-oro, estas redaktarĝento?
- Mi kaptis iam labrakon, sed la homo, al kiu tiu brako apartenas, ne ŝatis tion.
- Li prezentis ŝin al mi, dirante, ke ŝi estas lia nepino. Sed li ne bezonis diri tion; mi povis klare vidi, ke ŝi ne estas pino.

- Kom-pato estas foje bona, sed kiom ofte oni vere bezonas friti komojn?
- Papero estas tre utila, sed pli grava demando estas: Kial la Papo ne estas en unu peco?
- Mi certe havas kuraĝon; fakte, antaŭ longa tempo mi atingis sufiĉan aĝon por kuri.
- Ne ĉiuj legendoj estas vere legendaj; iuj estas sufiĉe tedaj.
- Estas strange ke oni povas trairi la tutan Nederlandon sen vidi unu nederon.
- Hierau mi vidis teruron. Fakte, mi neniam antaŭe vidis aŭ tion, aŭ normalan uron.
- Verdire, Eva estas simple ripeto de Adamo, ĉu ne?
- Oni ne plu multe aŭdas pri tajpisto; ĉu oni ne plu pistas en Tajlando?

Mesaĝo por libremuloj


Mi havas kelkajn librojn, kiujn mi trovis dum la jaro kaj aĉetis simple por revendi, se iu interesiĝas. Ili estas plejparte brokantaj, sed kelkaj estas preskaŭ novaj kaj kelkaj estas malfacile troveblaj:

- *Fundamento de Esperanto*, 9-a eldono, 1963 \$12.00
- *Winnie-la-Pu*, 1992 (tute nova libro)
(Mi havas unu ekzempleron) \$14.00
- *Teach Yourself Esperanto*, 2nd ed. 1974
(kun ekzemplero de la Wells-vortaro) \$ 9.00

Enketu ĉe mi, se vi volas aĉeti ion. — Liĉjo

Kio okazos hodiaŭ?

- ★ **7:30 – 8:15 atm**
matenmanĝo
Belk Dining Hall
- ★ **8:30 – 12:15 ptm**
lecionoj
Flowe
- ★ **12:30 – 1:15 ptm**
tagmanĝo
Belk Dining Hall
- ★ **2:00 — 3:15 ptm**
Elizabeto kaj Filipino DORCAS
forumo pri lokaj grupoj
Flowe
- ★ **3:15 — 4:30 ptm**
Greĉjo FORĜISTO
La Mistero de la Gerda-
kontraŭdiro
Flowe
- ★ **5:45 — 6:30 ptm**
vespermanĝo
Belk Dining Hall
- ★ **7:00 – 8:00 ptm**
KTF: prezento de radio-
programo en la teatro Leggett
(2-a etaĝo de Main)
- ★ **8:00 -- 9:00 ptm**
Douglas FALCÃO
Internacia muziko
Flowe



La NASKa Fasko estas forumo por ekzerci vin en verkado kaj dividi viajn verkojn kun aliaj lernantoj. Portu kontribuojn (artikolojn, poemojn, ŝercojn, bildstriojn, plendojn, amleterojn, ktp.) al la redaktoro en ĉambro 112, aŭ (eĉ pli bone) sendu ilin al <nask.esperanto@gmail.com>.